


# La 17a de decembro-2006
# ESPERANTISTA FESTO
# en CANDÁS



Dimanĉe, la 17an de decembro de la pasinta jaro okazis la festo de la geesperantistoj de Asturio. Tiu ĉi de la jaro 2006 estis organizita de nia E-rondo: Astura Esperanto-Asocio. Estis novaĵo la fakto ke ĉi-foje la celebrado ne okazis en nia urbo, nek en Avilés, sed en la apudmara urbeto Candás.
En la tiu-urba preĝejo okazis, tagmeze, meso en Esperanto, kiun oficis la jezuita pastro Jesús Ángel Fernández. Ni prezentas ĉi tie fotojn de tiu ceremonio, kaj aliajn de la partoprenintaj geesperantistoj de Gijón kaj Avilés ekster la templo kaj survoje al la restoracio kie fine okazis la kutima bankedo.
En agrabla etoso, post la tagmanĝado estis amuza dumvespera kunrestado, en kiu ne mankis kantado, deklamado... En la informo pri tiu akto, kiun ni publikigis en nia interreta paĝo, ni temas pri la raporto, kiun faris tie, iu membro de la E-Grupo de Avilés rilate al la ekzistado de iu antikva lingvo de la astura regiono, kiu ankoraŭ konserviĝas, sen ia ajn rilato kun la tre konata (kvankam malmulte parolata) BABLE-lingvo.Tiu arkaika lingvo, nomata BRON naskiĝis estis tre uzata dum Mezepoko kaj sekvintaj jarcentoj, fare de la kaldron-riparistoj kaj aliaj similiaj metiistoj transvagadis la Kastilian teritorion por tie labori. Tiu samideano iome deklamis en tiu lingvo, BRON, kaj ni povis konstati ke ĝi estas kroma latin-devena lingvaĵo kiu, tial, iamaniere parencas al nia ESPERANTO.

